

## & Ŝafoj kaj lupoj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sudinsulaj melodio kaj rekantaĵo de Jalgrujma balado, Norda Kantaro #4407.>

### (#Melodio:

<:29> (a;La /LaLa Tido TiLa La3;Mi LaLa Tido TiiLa;La dore mi3mi fami mi;mi redo mimi miLa; (#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La)

)×8 )+

### (&Strofoj:

'1 Militis jam de longa temp' ; la ŝafoj kun lup-hordo; la lupoj venkis laŭ kutim' ; havante pli da forto.

(×; **Tondru danco tre ĉarme ; nun tretu fiere ĉiuj en la ĉen' ; staras jen mastrino.**)

'2 La ŝafa grego fine do ; kun hundoj sin federis, ; kun help' ilia venkis la ; lup-hordon, ĝin forpelis. ....

'3 Post kelka tempo lup-sendit' ; aperis ĉe l'ŝaftrupo, ; kaj diris: "Kial la batal' ? ; La ŝafo kaj la lupo .....

'4 ja povas vivi kune, en ; konkordo, pac-anime, ; kaj ve, ni tamen, sen sekur', ; eterne tremas time. ....

'5 Ni, lupoj, estas bona gent', ; la pacon ni plej amas, ; vi, ŝafoj, sur la tuta ter' ; pri via mildo famas. ....

'6 La hundoj — tiuj ja sen ĉes' ; kverelas kaj intrigas, ; en pac' eterna vivos ni, ; se tiujn vi forigas." .....

'7 La belajn vortojn kredis la ; ŝafaro, kaj naive ; la hundojn ili sendis for. ; Atendis venĝsoife .....

'8 la lupoj, tiujn sur la kamp' ; atakis kaj masakris. ; La ŝafojn rabis ilin nun ; nenio jam obstaklis. ....)